

Malkoloniĝo kaj la krizo de energio, 3a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 572, 1974.09.25 & 28

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La subita altiĝo de la aĉetprezo de petrolo kaj aliaj krudaj materioj en 1973 malfermis al multaj homoj la okulojn. Ĝis tiam ili vivis en eŭforia atmosfero. La pasintan semajnon ni montris per kelkaj statistikoj la malfirmecon de la financa situacio de la ĉefaj industriaj landoj kapitalistaj (pri la komunistaj landoj ni ne posedas statistikojn, sed ili troviĝas antaŭ similaj situacioj). Ni vidis, ke por povi garanti sian vivnivelon multaj nacioj ne hezitis fari enormajn ŝuldojn. La plej drama sitacio estas tiu de Britio, kie tiuj ŝuldoj en 1972 reprezentis 81 procentojn de la nacia enspezo. En tiu lando la ŝarĝo de la interezoj atingas 12 % de la publikaj elspezoj. Por unu loĝanto tiu nacia ŝuldo atingas po 3'000 dolarojn. Fine ni memorigas, ke dum la pasintaj 4 jaroj 1968-1972 tiu ŝuldo kreskis de 31 %. Estas vera bankroto. En iom malpli malbona situacio troviĝas Belgio, Italio, Nederlando kaj Usono.

A.- Antaŭ la energi-krizo de 1973 ni sufiĉe senzorge ekzamenis tiujn ekonomiajn problemojn. La publiko ĝenerale opiniis, ke oni povas senlime elspezi, ĉar ankaŭ senlime progresas la nacia produkto-povo. Kiam grumblis pro mizero la loĝantoj en la tielnomataj subevoluintaj aŭ ekevoluantaj landoj, tiam la loĝantoj en la riĉaj nacioj levis la ŝultrojn kaj respondis : Ke ili laboru kiel ni ! Ili forgesis, ke plej ofte tiu mizero estas frukto de la koloniismoj, kiuj ĝuste riĉigis la okcidentan mondon.

Cl.- Jam de kelkaj jaroj, ĉefe sub la influo de la politiko de Popola Ĉinio, aziaj, afrikaj kaj amerikaj landoj komencis reorganizi sian nacian ekonomion. Unukultivadon anstataŭis varia kultivado. Tio aŭtomate signifis, ke la produktado de kelkaj fundamentaj produktoj malaltiĝis, inter ili sukero, kafo, kakao, vino, kotono, mebloligno, ktp. Post hezitoj la prezoj de tiuj varoj ekaltiĝis. La industriaj landoj ne povis reagi. Ankaŭ ĉe si ili praktikis varikultivadon kaj unukultivado estas unu el la heredaĵoj de la koloniismo.

A.- En la industriaj landoj tiuj prezaltiĝoj tuj kaŭzis salajr-altiĝojn, kaj la konsekvenco estis la altiĝo de la prezoj de la produktoj. La suferantoj de tiu situacio estis denove la malriĉaj landoj. En fakaj kunvenoj de UN kaj de ties dependaj mondorganizaĵoj la malriĉaj landoj esprimis plendojn pri tiu situacio. Samtempe formiĝis nacigrupoj por diskuti la fiksadon de bazaj prezoj por la krudaj materioj. Komence tiuj diskutoj malfacile disvolviĝis, ĉar ekskoloniaj registaroj ankoraŭ tro dependis de la eksmetropolo. Ili ne kuraĝis spiti la regintojn.

Cl.- Sed sufiĉe rapide la Tria Mondo konstatis, ke nek la industria mondo kapitalista, nek la sovet-komunista mondo estas kapablaj interveni kontraŭ kolektiva decido de ekonomika unuiĝo. Materion post materio oni rimarkis pli kaj pli drastajn prez-altiĝojn ĝis la epokfara subita atako de la petro-produktantoj.

A.- Tiuj prezaltiĝoj profunde modifas la hodiaŭan mondon. Por multaj industriaj landoj, kiuj ne posedas propran energi-fonton : akvo-energion, karbo-energion, atom-energion, tiu prezaltiĝo de la petrolo reprezentas preskaŭ bankrotigan plian elspezon. La registaroj de tiuj landoj ne kuraĝas tuj komprenigi al la loĝantoj la naciajn ŝuldojn. Ili ĝenerale provas elturniĝi kreskigante la naciajn ŝuldojn. Sed tiu politiko povas esti nur efemera. Aliaj registaroj serĉas rimedojn por malaltigi la energi-konsumadon, kie ĝi povas esti ŝparata. Ĉiuj, plimalpli, provas pretigi la publikan opinion al fundamentaj ŝanĝoj en la viv-kutimoj.

Cl.- Ĉar nur nombroj permesas kompreni la faktojn, ni menciuj, ke por la dek industriaj landoj : Belgio, Germanio okcidenta, Francio, Britio, Italio, Japanio, Nederlando, Svedio, Svislando kaj Usono, la suplementa ŝarĝo, kiu rezultas de la prez-altiĝo de la petrolo reprezentas cent miliardojn da svisaj frankoj por 1974, tio estas 33 miliardoj da usonaj dolaroj.

A.- Tio reprezentas pli ol la progreso de la sumo de la krudaj naci-enspezoj en tiuj landoj. Konsekvence tiuj landoj malriĉiĝos profite al la produktantoj de petrolo. Malriĉiĝo signifas plimalpli rapide redukton de la viv-nivelo en tiuj landoj aŭ drastajn ŝparojn de ĉiuj nenecesaj elspezoj kaj absolutan eviton de nenecesa energi-konsumado.

Cl.- Se ni rigardas al 1973, oni konstatas, ke la publikaj instancoj en Francio, Britio kaj Italio kune pruntis pli ol 20 miliardojn da svisaj francoj (proksimume 7 miliardojn da usonaj dolaroj) nur pro la altiĝo de la aĉetprezo de la petrolo. Tiuj pruntoj, kiuj adiciiĝis al la antaŭaj, kiujn ni priskribis la pasintan semajnon, kondukis al vera krizo, kies konsekvenco estas la daŭra altiĝo de la interez-procento. Oni povas konstati, ke tiu krizo estas tutmonda. Ĝi plej grave influas la ekonomion en la industriaj landoj kapitalistaj, sed ĝi ankaŭ suferigas la komunistajn landojn kaj la Trian Mondon.

A.- Neniam la homoj tiel forte sentis, kiel hodiaŭ, ke la homaro formas nedisigeblan tuton. La energi-krizo favoras analizadon de la situacio. Tiurilate ni prezentos al vi pozitivan studon, kiun ĵus publikigis la grava svisa asocio Svisa Ligo por la Protekto de la Naturo. Sed la energi-krizo ankaŭ povas konduki popolojn al perforta konduto. Pli drame ol neniam la homaro troviĝas antaŭ la dilemo : mondfederacio aŭ internaciaj luktoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!